


9

1981

MONATA REVUO
FONDITA
EN JARO 1903

OFICIALA ORGANO
DE I.K.U.E.
INTERNACIA
KATOLIKA UNUIGO
ESPERANTISTA



**ESPERO
KATOLIKA**

INTERNACIA KATOLIKA UNUIGO
ESPERANTISTA*Honora Prezidanto:*

Sac. Alfons Beckers
Rozenlaan, 5
B - 3950 Beringen (Belgio)

Prezidanto:

Sac. Duilio Magnani
viale C. Zavagli, 73
I - 47037 Rimini/Forlì, Italio

Vicprezidantoj:

Sac. Roger Degrelle, B.P. 23, F-54510 Tomblaine,
Francio;
Sac. Józef Gotter, Trzebnice 113, PL-59.312
Chocianowice, Pollando

Sekretario:

Antonio De Salvo

Kasisto:

Sac. Felice Ruaro, I-37010 Costermano (Verona),
Italio

Estraro:

A. Beckers, R. Degrelle, A. De Salvo, R. Forycki,
J. Gotter, L. Kóbor, J. Kondor, J. Korytkowski,
F. Ruaro, J. Zielonka

Plenumkomitato:

Aŭstrio: W. Mudrak; *Belgio:* E. Paesmans; *Ĉeĥo-
slovakio:* J. Pastrnakova, M. Šváček; *Francio:* L.
Bourdon; *F.R. Germanio:* B. Eichkorn; *Hispanio:*
M. Casanoves; *Hungario:* E. Stancz; *Italio:* A. Cic-
canti, S. Giacchino, G. Pisoni; *Nederlando:* S. P.
Smits; *Pollando:* J. Korytkowska, J. Kos, B. Sobol;
Svislando: F. Bommer; *Usono:* K. Laughery

Centra Oficejo:

Via Berni, 9
I - 00185 Roma (Italio)
tel. (06) 7588388
poŝta konto 23290000
Direktoro: Antonio De Salvo

Oficiala organo:

Espero Katolika

Kotizo por 1981:

22 svisaj frankoj aŭ egalvaloro

Registriĝo ĉe la Tribunale de Romo

(Registrazione presso il Tribunale di Roma)
n. 17138, 11-2-1978

Respondeca Direktoro (Direttore Responsabile):

Antonio De Salvo
C.P. 4017, I - 00100 Roma Appio (Italio)
tel. (06) 7810782 (vespere)

Presejo (Tipografia):

ROTATORI
Viale Manzoni, 22/b - Roma

Sur la kovrilo: la brazila Ĉefepiskopo Hélder Pessoa
Camara, mondkonata batalanto por justeco kaj paco
(v. p. 140 kaj 154). *Foto Ansa.*

ENHAVO

- 139 Nia esperantista Ekumena Kongre-
so (*B. Cadei*)
- 142 Kelkaj decidoj de la Estraro dum
la Kongreso en Dalfsen
- 143 Protokolo de la Ĝenerala Kunveno
de IKUE
- 145 Ni dankas
- 145 Ni funebras kaj kondolencas
- 145 Papaj preĝintencoj por oktobro
- 145 Papaj preĝintencoj por novembro
- 146 Kunsido de la Liturgia Komisiono
en Dalfsen
- 147 Tra la movado
- 150 Legantoj skribas
- 153 Katolika horizonto
- 154 IKEK: Infana Katolika Esperan-
to-Klubo (*R. Degrelle*)
- 156 Asociaj notoj
- 157 Fonduso « Pentekosto » (*D. Ma-
gnani*)
- 158 Lingvaj problemoj en la Eklezio
- 159 La Evangelio al la Afrikanoj (*Bian-
chi*)
- 160 Landaj Rerezentantoj de IKUE

La fotoj de ĉi tiu numero estis afable liveritaj de:
la itala Registaro (Pres. Cons. Ministri); J. Van
Keulen (*Nederlando*); J. Kondor (*F. R. Germanio*);
E. Fiutak (*Pollando*).


Periodico culturale - gruppo III - pubbl. inf. 70%
lire 600.

Kultura periodaĵo - monata - malpli ol 70% da
reklamo - 600 lirejn.

NIA ESPERANTISTA EKUMENA KONGRESO

Ne estas la unua fojo, ke okazas komuna kongreso de ambaŭ branĉoj de la kristanaj Esperanto-organizaĵoj, nome, de la protestanta KELI kaj la rom-katolika IKUE. La ekumenismo ne estas ia superflua hobia, sed ja esenca, nerezignebla postulo de la kristanismo.

Ĉi-jare, la ekumena kongreso de kristanaj esperantistoj okazis en Dalfsen, Nederlando, de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto, kun partopreno de ĉirkaŭ 150 gekongresanoj el 17 diversaj landoj. La kongreskomitato laboris nelacigeble. S-roj Vernooy, Smits kaj s-ino de Jong atendis en stacidomoj la kongresantojn, por ke ili atingu la gastigaman, modernan kongresejon « *De Bron* » (La Fonto).



S-ro Krikke (foto Van Keulen)



P. Degrelle (foto Van Keulen)

Sabate vespere, la 25-an de julio, la prezidanto, s-ro Krikke, malfermis la kongreson. El protestanta flanko sentoplene salutis s-ino Koopmans, kiu plenigis la tutan kongreson per sia fervora parolado kaj siaj kortuŝaj kantado kaj muzikado. El katolika rondo varme salutis pastro Roger Degrelle, kunprezidanto de la kongreso. Oni transdonis la salutojn de forestantoj pro malsano aŭ okupiteco, inter ili la prezidanto de IKUE pastro Magnani, kiel ankaŭ de tiuj el oriento kiuj ne ricevis ŝtatan rajtigojn por forvojaĝi.

Nia agado komenciĝis per preĝado kaj kantado. Ĉi-rilate menciindas pastoro Adolf Burkhardt el Germanujo, kiu lerte instruis koruson kaj gvidis la kantadon dum la tuta semajno.

Dimanĉe matene okazis ekumena Diservo, zorge preparita de pastro Eichkorn en Germanujo. Predikis la nederlanda pastoro van Achterberg, deirante el la jenaj vortoj de la profeto: « *Mi alfluigos super vin abundon da paco* ». Sekvis katolika Meso, kuncelebrata de dekduo da pastroj. Estis korŝire konstati, ke nia neplena unueco ne jam permesas al ĉiuj partopreni en la sama komunio.

En la posttagmezoj kaj vesperoj disvolviĝis pluraj aranĝoj: estrarkunsidoj, bibliaj temoj, lingvaj problemoj (s-ro de Hoog), spektado de diapositivaj. Laŭ nederlanda kutimo, la aranĝojn agrable interrompis kafo-paŭzoj.

Lunde, la franca dominikano patro Bourdon fervore prelegis pri Biblio kaj ekumenismo. La Eklezio estas por la Regno de Dio, kiun ĝi devas manifesti per la frataj repaciĝo kaj amo. Post la prelego la kongresanoj disiĝis en diskut-rondetojn.

Marde, pastoro Jelly Koopmans pasie traktis pri Biblio kaj roloj de la virino, kaj pri la klopodoj de la eklezioj redoni al la virino ŝian ĝustan rolon en la kristanaj komunaj. En la diskut-rondetoj okazis respekto-plena konfronto inter la katolikaj kaj protestantaj starpunktoj ĉi-koncerne.

Merkrede okazis tuttaga ekskurso al sud-orienta Drente. Ankaŭ en la antaŭaj tagoj okazis duontagaj ekskursoj al Vilsteren, Giethoorn, Ommen, tiel ke ebligis kontakto kun pluraj flankoj de la nederlanda vivo kaj historio.

Ĵaŭde vespere, en la reformita preĝejo de la vilaĝo Oud-Leusen, ni celebris ekumenan Diservon kun prediko de pastro Degrelle pri manao, la mirakla nutraĵo en la dezerto, kaj pri la du disĉiploj en Emaus. Sekvis pro-



Past-ino J. Koopmans (foto Van Keulen)

testanta festo de Sankta Manĝo. Ne ĉiuj partoprenis en ĝi; sed ĉiuj intense preĝis, ke baldaŭ venu la tempo de unu nura komunio de ĉiuj kredantoj en Kristo.

Vendrede pastoro Ciril Horak el Ĉeĥoslovakio prelegis pri Biblio kaj paco. Ĉiuj popoloj, ĉu orientaj, ĉu okcidentaj, volas pacon, sed paco ne estas! Ni devas multe preĝi, forgesi la malbonajn ekzemplojn, imiti modelajn kristanojn kiel Albert Schweitzer, Martin Luther King, Helder Camara, Tereza de Kalkuto, Luthuli.

En la sama tago okazis pluraj liberaj aranĝoj, kiel mallonga prelego de pastro Kóbor el Hungarujo, pri helpo al Agado E3 por blinduloj en Kamerunio, iniciatita de gesinjoroj Tuinder, kaj pli ĝenerale pri helpo al bezonuloj, sendepende de religiaj aŭ konfesiaj apartenoj.



Amika diskutrondo (foto Kondor)



Esperantistaj pastroj (foto Kondor)


Sinjoro Philippe Cousson, estrarano de KELI, parolis pri Esperanto-agado inter geknaboj (ĉi-okaze ni konstatas kun ĝojo, ke en ĉi tiu kongreso ĉe-estis deko da diverslandaj geknaboj).

Grupo de IKUE-anoj kaj KELI-anoj interesplene informiĝis kaj diskutis pri la Esperanto-programoj de Radio Vatikana.

Sabate matene la kongresanoj adiaŭis sin reciproke.

Ni finas nian raporton dirante, ke ĝi estis kongreso senambicia, sed kun vere gefrata etoso, tiel ke, kredeble, ĉiu revenis hejmen kun pli profunda sindevigo por la ekumena agado. Por tio ni ŝuldas dankon al la Sinjoro.

Sac. B. Cadei, Italio



P. Köbor (foto Van Keulen)

KELKAJ DECIDOJ DE LA ESTRARO DUM LA KONGRESO EN DALFSEN

- Oni komisiis P. Beckers prilabori novan tekston de la IKUE-statuto, rilate Plenumkomitaton (art. 21-23), voĉdonotan de la Ĝenerala Kunveno dum la venonta IKUE-Kongreso. Oni ankaŭ studu la eblecon, ke la Prezidanto estu elektata de la Estraro anstataŭ de la Ĝenerala Kunveno.
- Oni decidis eldoni, dank' al la financa profito de la Kongreso, kongreslibreton kun la ĉefaj paroladoj.
- La Ekumena Komitato decidis plirapidigi la eldonadon de diversaj kantikoj (sur slipoj), pripensi la venontan Ekumenan Kongreson, atentigi pri komunaj liturgiaj tekstoj de kredkonfeso kaj kelkaj prefacoj.
- Estas jam aktuala la eldono de nova adresaro; ĝi estu facile trarigardebla.

PROTOKOLO DE LA ĜENERALA KUNVENO DE IKUE (Dalfsen, 30.7.81)

Ĉeestas kvindekda partoprenantoj. Prezidas Pastro Degrelle, kiu dankas al la nederlandaj gefratoj, kiuj multe laboris por nia afero: inter ili s-ro Vernooij, s-ino de Jong, s-ro Smits, ges-roj Tuinder.

Raporto de la Estraro

P. Kóbor raportas pri la laboro de la estrarkunsido: konfirmo de 4 deĵorantoj en la Centra Oficejo en Romo (De Salvo, Laughery, Lipari, Cadei); plialtigo de la kompenso al De Salvo kaj Lipari ekde 1982; nova kongresregularo, preparita de P. Beckers (ĝi aperos en EK); elekto de P. Degrelle kiel *unua* Vicprezidanto; priŝtrakto de la landaj asocioj (precipe demandoj pri kotizoj, rilate al tri kategorioj: membro-abonantoj; nur abonantoj; nur membroj).

Landa agado

P. Degrelle proponas, ke po unu reprezentanto de ĉiuj landaj asocioj mallonge raportu.

Aŭstrio (Mudrak): temas pri nura sekcio de la nacia E-ligo; ĝi prizorgas kursojn kaj agadas ankaŭ per radio.

Belgio (Beckers): ne ekzistas landa asocio. La katolikoj partoprenas en la landa neŭtrala ligo. Ekzistas nur membroj-abonantoj. Oni intencas varbi ankaŭ nurajn abonantojn.

Ĉeĥoslovakio (Kóbor el Hungario): la IKUE-sekcio estis aboliciita. EK oficiale ne estas allasata. Ekzistas privataj kontaktoj kun la ĉeĥaj kaj slovakaj katolikaj esperantistoj, kiuj estas tre fervoraj.

Francio (Degrelle): 60 membroj de IKUE, sed la landa ligo konsistas entute el 200 membroj. Bulteno 4-foje jare.

F.R. Germanio (Kondor): 85 membroj-abonantoj. Kondor regule aperigas artikolojn en la loka gazetararo.

Hungario (Kóbor): 60 membroj-abonantoj plus 10 nur abonantoj. En Budapeŝto estas vigla katolika grupo, kun monata S. Meso. Ankaŭ ekumena biblia studado.

Irlando: du IKUE-anoj.

Italio (Ciccanti): ĉirkaŭ 200 IKUE-anoj. Dumonata bulteno. Kongreso ĉiun trian jaron. Okazas interregionaj kongresoj.

Japanio (Thalmaier el F.R. Germanio): dum plursemajna estado en Japanio li renkontis katolikajn esperantistojn.

Jugoslavio (Bosiljeviĉ): Pastro Grujiĉ tre aktivas. 70 IKUE-anoj.

Koreio Suda (Thalmaier): li renkontis katolikan esperantiston.

Madagaskaro (Goudé el Francio): la tieaj esperantistoj havas internajn problemojn.

Maroko (Goudé): li kontaktas kun tiea pastro.

Nederlandaj Antiloj (Smits el Nederlando): post la morto de frato Mulders, li ne konas tie aliajn esperantistojn.

Nederlando (Smits): « Komuna Esperanto-Gazeto », kies redaktoro li estas, havas sekcion pri IKUE. Kunlaboro kun la Federacio de Esperanto-Organizoj en Nederlando.

Pollando (Płatek kaj Forycki): la Episkoparo disponigis animzorgantojn por esperantistoj. Ekzistas pluraj « Esperanto-Oazoj ». Okazas Spiritaj Ekzercoj kun internacia karaktero (precipe por orienteŭropanoj). Pluraj E-lingvaj S. Mesoj. Oni diskutas, ĉu la katolikaj esperantistoj fariĝu membroj de Pola Esperanto-Asocio.

Sovetunio (Cadei el Italio): sciigoj pri pluraj katolikaj esperantistoj en Litovio, sed ankaŭ aliloke. Ili havas malfacilaĵojn. Propono de P. Degrelle: IKUE-anoj mendu ĉe la Centra Oficejo Bibliojn havigotajn al sovetiaj gefratoj.

Svislando (Bommer): 23 IKUE-anoj. Li dissendas al ili po 4 cirkulerojn jare.

Balotado

Alia punkto de la tagordo estas la venontjara balotado. Oni sendu cirkuleron al la estraranoj, kun demando, ĉu ili volas rekandidatiĝi. La kandidatoj estu kiel eble plej internaciaj, kaj inkluzivu ankaŭ virinojn. La kandidatoj sendu al la C.O. resumon de sia kariero.

Libroj

Oni komisiis s-ron Smits pri kontaktoj kun KELI por eldonaĵoj por infanoj.

Espero Katolika

Laŭ P. Thalmaier, ĝi estas tro itala kaj pola. Laŭ aliaj, ĝi estas ne sufiĉe internacia. Oni faru pli profundajn artikolojn, sed ne tro longajn. La leteroj al la Papo rabas spacon, kiun oni povus uzi alimaniere. Laŭ P. Cadei, religiaj aktualaĵoj kaj edifaĵoj tre gravas por orientanoj, kiuj ne povas legi alian religian gazetaron. Iuj proponas aldoni folion nur por orientaj legantoj.

Laborplano

P. Degrelle proponas, ke la Plenumkomitato havu la samajn rajtojn kiel la estraro. La propono akceptiĝas unuanime kun unu sindeteno.

Oni plendas, ke mankas la raporto de la kasisto.

Oni komuniĝas, ke estis starigita Liturgia Komisiono. Same pri Ekumena Komitato, kiu konsistas el P. Degrelle kaj P. Bourdon por IKUE, kaj P. Burkhardt kaj P. Koopmans por KELI.

La eldono de la londona « Nova Testamento », kiu estas elĉerpita, pretas represi ĝin, kontraŭ mendo de minimume 1.000 ekzempleroj niaflanke: jes.

Porpastraj Seminarioj

P. Eichkorn parolas pri sia agado, pri la klopodoj kontakti kun la seminariaj superuloj.

Stipendio por triamonda seminariano

Oni instigas pliriĉigi la fonduson.

Infana Sekcio

Oni instigu infanojn skribi al ĝia prizorganto, P. Degrelle.

Venonta IKUE-Kongreso

Limdate de oktobro, P. Bourdon respondos, ĉu eblas organizi ĝin en Lille (Francio) en 1982. Se ne, ĝi okazos en 1983 en difinota loko. En 1984 okazos denove Ekumena Kongreso IKUE-KELI, en Hamburgo (F.R. Germanio).

La protokolinto: Cadei

NI DANKAS

Donacis monon al IKUE:

Belgio: Muller, Orban; *F.R. Germanio:* Peters, Stahl; *Italio:* Balacco, N.N.; *Usono:* Herschel, Woodrow Low.

Donacis monon por la misia agado de P. Sadowski en Madagaskaro (v. EK 7-8/81):

Francio: Thiollière; *F.R. Germanio:* Eder J; *Nederlando:* diversaj partoprenintoj en la Komuna Kongreso IKUE-KELI 1981.

Donacis Esperantaĵojn al IKUE:

Aŭstrio: Mudrak; *Belgio:* Christiaens; *Britio:* Kvakera Esperantista Societo; *Francio:* Bourdon; *F.R. Germanio:* Eichkorn, Kondor; *Italio:* De Salvo, Gabrielli, Magnani; *Pollando:* Dorosz, Fiutak; *Vatikano:* Radio Vatikana.

Al ĉiuj donacintoj, multajn dankojn.

NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS

† S-ro W.J.A. Van Oorschot, *Nederlando*;

† Frato Arnold Mulders, *Nederlandaj Antiloj*;

† S-ro Pietro Brovelli, *Italio*.

Ni memoru pri ili en niaj preĝoj.

Al la funebrantaj familioj, multajn kondolencojn.

PAPAJ PREĜINTENCOJ POR OKTOBRO

Ĝenerala: por ke la alvokoj kaj la iniciatoj de la Plejsupra Pontifiko, por la konstruo de la paco en la vero, sukcesu estingi la naskiĝantajn konfliktojn.

Misia: por ke Ĉinio malfermiĝu al la Evangelio anoncata de la Eklezio.

PAPAJ PREĜINTENCOJ POR NOVEMBRO

Ĝenerala: por la mortontoj, kaj por tiuj, kiuj asistas ilin.

Misia: por la Eklezio en Suda Afriko.

KUNSIDO DE LA LITURGIA KOMISIONO EN DALFSEN

Konstatinte, ke parto de la membroj de la Liturgia Komisiono (v. EK 6/81, p. 100) ĉeestas en la Kongreso, oni interkonsentas okazigi kunsidon, por interŝanĝi opiniojn kaj formuli proponojn, kiujn oni transdonos al la neĉeestantaj komisionanoj.

28.7.81 kunsidas pastroj Degrelle, Eichkorn, Beckers, Thalmaier, Forycki, Płatek, Kõbor, Ciccanti kaj Cadei.

P. Degrelle proponas, ke prezidu la kunsidon p. Eichkorn: propono unuanime akceptita. Sekretarios p. Cadei.

P. Eichkorn proponas, ke oni legu kelkajn notojn de p. Cadei pri celo, konsisto kaj labormetodo de la Liturgia Komisiono.

P. Beckers rimarkigas, ke, sekvante la proponojn de tiuj notoj, oni bezonus 15 jarojn!

P. Degrelle diras, ke, kiel unuan paŝon, oni devas korekti la « Malgranda Misalo »-n.

P. Cadei diras, ke multe da laboro jam estas farita: oni ne startas de nulo. Oni kolektu la tekstojn, jam aprobitajn aŭ ne, ĝis nun esperantigitajn. Aliflanke, ankaŭ la nacilingvaj Komisionoj, kiuj havis je dispono pli da fakuloj ol ni, laboris plurajn jarojn.

Ankaŭ P. Ciccanti emfazas, ke oni devas eluzi la jam faritan laboron.

P. Kõbor diras, ke oni devas strebi al kiel eble plej internacieca teksto: en la nun ekzistantaj liturgiaj tekstoj foje sentebblas itala aŭ pola fono.

Oni konsentas, ke estas dezirinde, ke unu komisionano fariĝu fakulo pri ekleziaj (precipe konciliaj) dokumentoj pri liturgio, kaj, krome, starigu kontaktojn kun la vaticanaj (kaj ankaŭ diocezaĵaj) instancoj pri liturgio. Kiel animpaŝtistan fakulon pri liturgio proponas sin P. Eichkorn. Kiel lingvajn fakulojn oni proponas plurajn nomojn, ankaŭ de nekatolikoj; tamen oni ne protokolas tiujn nomojn: unue, ĉar ni kunsidas neformale, due, ĉar ŝajnas pli konvene starigi personajn kontaktojn, kiam la farota laboro estos konkrete difinita.

Ĉar la konkretaj spertoj povas multe helpi, kaj ĉar estas devige, komuniki al la Centra Oficejo de IKUE ĉiun Esperantlingvan S. Meson, oni rekomendas, ke oni faru precizajn raportojn, kiuj konsistigu valoran dokumentaron por la preparotaj tekstoj.

P. Degrelle donas praktikan konsilon: se oni multobligas tekston por iu Diservo, oni faru tion nur en tre limigita kvanto; se ne, la preparitaj tekstoj ne vendeblos. Oni sendu al la C.O. ekzempleron de eventuale multobligitaj tekstoj.

Pri la kriterioj de la liturgiaj tekstoj: fideleco al la kredo kaj al la latina originalo; internacieco; facileco sen banaleco; kiel en la nacilingvajn versiojn, ankaŭ en la Esperantan oni devos allasi kelkajn fakajn esprimojn. Por labori sur la lingva kampo proponas sin P. Ciccanti kaj P. Cadei.

P. Ciccanti proponas, ke oni kontaktu P. Jacobitti pri la ĝis nun farita laboro.

Kiel faris la nacilingvaj Komisionoj, oni traduku unue la dimanĉajn kaj festajn mestekstojn.

La protokolinto: P. Cadei

TRA LA MOVADO

● Artikolo pri la 50-jara datreveno de Vatikana Radio, tradukita kaj koncizigita el « Espero Katolika » 2/81, aperis en la belga bulteno por radi-amatoroj « *Echos Radio* » 16/1981 (majo 1981), zorge de la Dumviva Membro de IKUE Michel Pilloy. Komence de la artikolo estas eksplicite dirite, ke temas pri traduko el Esperanto: krome, estas emfazitaj la ekzisto de elsendoj en Esperanto kaj la favora reago de la aŭskultantoj.

● F-ino Jeannine Gilles el Beaune, Francio, iĝis Dumviva Membro de IKUE.

● Laŭ iniciato de la itala kapuceno Riccardo Di Prinzio, ilustrita artikolo pri la « Eŭkaristia Miraklo de Lanĉano » aperis (en formo de « pagita anonco ») ĉe paĝoj 251-253 de la Jarlibro 1981 de Universala Esperanto-Asocio.

● Kolora bildkarto, kiu prezentas la faman « Tombon de Julieta » en Verono (Italio) kaj frazon en Esperanto, estis eldonita de s-ro Renato Tommasi. Dorsflanke, la bildkarto surhavas ankaŭ la adreson de IKUE.

● 10.5.81 havis lokon en Radom (Pollando) la unua kunveno de nove fondita IKUE-rondo, kun S. Meso en Esperanto celebrita de P. Jòzef Zielonka el Tarnòw. La kunveno okazis en la paroka domo de Palotanoj, kaj la S. Meso en la tiea kapelo; dank' al preparitaj mes- kaj kant-tekstoj, la partopreno estis vigle aktiva. Multaj unuan fojon partoprenis en tia soleno; regis kortuŝa etoso.

● Pilgrimo al la Sanktejo de la Graveda Dipatrino en Matemblevo (Pollando) okazis 31.5.81, zorge de la Gdanska Katolika Oazo de Esperantistoj. S. Meson en Esperanto kuncelebris pastroj Jòzef Zielonka el Tarnòw kaj Stanisław Płatek el Gdańsk. Ĉeestis 32 geesperantistoj, kiuj, poste, partoprenis kunvenon en la arbaro.

● S. Meso en Esperanto havis lokon, 7.6.81, en la preĝejo de dominikanoj en Kielce (Pollando). Celebris P. Jòzef Zielonka el Tarnòw: partoprenis 23 personoj.

● Responde al la letero sendita al la Papo, de P. Magnani, 17.5.81 (v. EK 6/81, p. 97), Mons. Martines, anstataŭanto de la Stata Sekretario, skribis, interalie, 8.6.81: « *La esprimoj de ameno kaj de bondeziro, kiujn Vi, nome de la tuta esperantista familio, bonvolis adresi al la Plejsupra Pontifiko por bondeziri lian baldaŭan resaniĝon, estis kaŭzo de granda konsolo kaj kontentigo por Lia animo. Laŭ komiso de la Sankta Patro, mi transdonas al Vi koran dankon pro ĉi tiu atesto de profunda devoteco* ».

● En la kadro de la « *Esperanto-Tagoj* » okazis en Krakovo (Pollando), 14.6.1981 je la 8-a, en la Akademia Kapelo, S. Meso en Esperanto, celebrita de la krakova animzorganto P. W. Martuszewski. Partoprenis multaj geesperantistoj el diversaj lokoj de Pollando, inkluzive de ĉirkaŭ 50 el Krakovo mem.

● 60 personoj partoprenis (8-15.7.81) Spiritajn Esperanto-Ekzercojn en Gostyń, ĉirkaŭ 80 km sude de Poznań (Pollando). Pro la konataj malfacilaĵoj, ĉijare ne venis gastoj el eksterlando.

Ĉiutage okazis S. Meso en Esperanto; celebranto estis P. Józef Zielonka el Tarnòw, kaj dufoje kuncelebris P. Józef Gotter el Chocianowiec.

Dum ĉiutagaj kunvenoj, oni preĝis, kantis, kaj aŭskultis prelegojn aŭ versaĵojn. Tagmeze oni preĝis anĝeluson, en spirita kunligo kun la Papo, kaj vespere oni partoprenis Diservon kun rozario.



Spiritaj Esperanto-Ekzercoj en Gostyń 1981 (foto Fiutak)

● Aperis en Romo, en julio, 87-paĝa «*Katalogo de Esperanto-periodaĵoj ĉe Universitata Biblioteko de Katolika Universitato en Lublin*», zorge de Anna Grabowska kaj Edward Wojtakowski.

Eldonis la libreton (kiu kompletigas la konatan «*Decimala Katalogo de la planlingva literaturo*» de E. Wojtakowski) Czesław Biedulski.

Ambaŭ katalogoj estas aĉeteblaj ĉe IKUE, respektive por 3.000 liroj (tiu de periodaĵoj) kaj 10.000 liroj (tiu de literaturo); *la prezoj inkluzivas sendokostojn*.

● Kadre de la 19-a Somera Esperanto-Universitato en Gyula (Hungario), 10.7.81 okazis S. Meso en Esperanto.

● Okaze de la Internacia Konferenco de ILEI (Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj) en Gödöllo apud Budapeŝto (Hungario), P. Ferenc Nádi el Inota celebris S. Mesojn en Esperanto, 12.7.81 kaj 19.7.81. En Gödöllo havis ankaŭ lokon, 12.7.81, Ekumena Diservo en la internacia lingvo.

● Preskaŭ 1.500 personoj partoprenis, dimanĉon 26.7.81, S. Meson en Esperanto en la Katedralo de Brasília (Brazilo), okaze de la Universala Kongreso de Esperanto. Kuncelebris Pastroj Bruno Ostropolski (Argentino), Pedro Urbaitis (Brazilo), Sigmund Klimowicz (Usono), Roque (Brazilo), Nogueira Machado (Brazilo) kaj Kowal (Pollando).

Ĉeestis kunvenon de IKUE, vendredon 31.7.81, ĉirkaŭ 45 personoj, kiuj — laŭ certigo de P. Ostropolski — «*estas nun pretaj agadi por Esperanto en siaj katolikaj medioj*».

● Mons. Karl Berg, Ĉefepiskopo de Salzburg (Aŭstrio), skribis 6.8.81 al s-ro Walter Mudrak, Landa Reprezentanto de IKUE en Aŭstrio: «*Pro la atentaj salutoj de la 5-a Ekumena Esperanto-Kongreso de la katolikaj kaj evangeliaj esperantistoj en Nederlando mi volas kore danki al vi*». La originala teksto estas en germana lingvo.

● En dukolumna artikolo, titolita «*La ĉeĥaj gejunuloj reiras al Dio*», aperinta en n. 28/81 de la dioceza gazeto «*Il Ponte*» de Rimini (Italio), P. Duilio Magnani detale parolis pri la renkontiĝo de 21.5.81 inter delegacio de IKUE kaj Kard. Tomašek (v. EK 7-8/81, p. 125), kaj menciis la problemojn, kiujn ankaŭ katolikaj esperantistoj spertas en Ĉeĥoslovakio.

● *Invito al Skiferioj* en St. Magdalena (Sudtirolo/Alta Adiĝo, Italio), en la semajnoj 27.12.81-3.1.82 kaj 4.1.82-11.1.82. Eblas partopreni ambaŭ semajnojn. Skiado. Vesperaj kursoj esperantlingvaj pri «*Enkonduko en legadon de la Biblio, precipe de la Malnova Testamento*» (gvidas Patro d-ro W. Kuhnigk) kaj «*Eklerno de manpupludado aplikebla en festoj*» (gvidas H. J. Kindler-Trixini); prelego de H. J. Kindler-Trixini, kun lumbildoj, pri «*Kvin monatoj en Sud-Orienta Azio*». Diversgradaj Esperantokursoj. Informoj kaj aliĝoj ĉe P. Bernhard Eichkorn, Kolpingstr. 8, D-7790 Messkirch, F.R. Germanio.

LEGANTOJ SKRIBAS

● Mi legis, en EK 3-4/81, la plendon de Sac. Jan Kos el Pollando, kiu, pasintjare, ne trovis en Nazareto, en la Baziliko de la Anonco, la bildon de « *Nia Sinjorino de la Espero* ».

Kiam, ĉi-printempe, mi pilgrimis al la Sankta Lando, mi vidis la kor-tuŝan bildon, sub la portiko, dekstre.

Maria Nosedà Ceci Neva, Italio

● Post 22 jaroj, mi transdonis la sekretariecon de KELI. Anstataŭ min, nia jarkunveno nomis du sekretariojn; ĉe la unua (s-ro Jean-Eric Perrin, 4 Impasse Delaunay, F-75011 Paris, Francio) nun estas la sidejo de KELI.

Mi volas danki pro la agrabla kunlaboro kun vi.

Tini Putto, Nederlando

● Mi tra legis la artikolon « *Liturgia en Esperanto* » (EK 5/81, p. 76), kaj, precipe, la aldonitajn « Regulojn ».

Laŭ la premiso de la paragrafo 1), « *Esperanto ne estas lingvo parolata de la popolo* ».

En Esperanto, la negacio devas esti ĉiam antaŭ la vorto, kiun oni neas. Sed ne ĉiam oni observas tiun regulon. Fakte oni ne povas nei « *estas* », ĉar Esperanto ekzistas. Ĉu oni neas « *lingvo* »? Neeblas, ĉar Esperanto ekzistas, kaj ĝi ekzistas kiel lingvo. Ĉu oni neas « *parolata* »? Nur kiu ne konas ĝin aŭ ĝin ne parolas, povus aserti tion. Do, konklude, laŭ tiu formulo oni volas aserti, ke ne ekzistas *popolo*, kiu parolas Esperanton, kaj pro tio ĝi ne povas esti konsiderata liturgia lingvo.

Mi ne estas fakulo pri tiaj aferoj; sed mi demandas: ĉu la latina lingvo estas liturgia lingvo? Se jes, de kiu popolo ĝi estas parolata?

Pietro Dao, Italio

Efektive, la interpreto de s-ro Dao estas ĝusta: la frazo de la Kongregacio intencas diri, ke ne ekzistas popolo, kiu parolas Esperanton.

Malpli trafa estas la komparo inter Esperanto kaj latino. Fakte, la latina lingvo (samkiel la hebrea, la greka, la araba, la praslava, kaj eble aliaj) estas liturgia lingvo pro historiaj kaŭzoj, sendepende de la fakto, ĉu ĝi estas nun parolata de iu popolo aŭ ne. La Dua Vatikana Koncilio malfermis la Liturgion ankaŭ al aliaj lingvoj, sed nur kondiĉe, ke temu pri lingvoj parolataj de iu popolo: la celo, ja, estis pure animzorga, kaj rilatis al la oportuneco alproksimigi la homojn al la Liturgio (aŭ, se oni preferas, la Liturgion al la homoj), ebligante pli vastan kaj konscian partoprenon. Tamen, restas iu neta distingo inter la « *bazaj* » liturgiaj lingvoj kaj tiuj « *popolaj* », kiuj estas egaligataj ekz. al latino, sed ne pro la samaj ecoj kaj kaŭzoj.

Antonio De Salvo

● Mi volus ion aldoni al la statistiko pri esperantistaj seminarianoj en Pollando (v. EK 7-8/81, p. 124). En Tarnòv ekzistas pli ol 8 da ili. Mi instruas Esperanton, en la tiea Seminario, ekde 1974; ĉijare lernis la lingvon 30 seminarianoj, el kiuj 20 subiĝis al publika ekzameno, kaj ricevis specialan noton enskribitan en la atestiloj. La aliaj 10 ektimis la ekzamenon, kiu estas libervola, sed ankaŭ ili ne ĉesis esti lernantoj kaj esperantistoj. Generale, tiel aspektas la situacio ĉiujare. Do, multaj seminarianoj kaj pastroj konas Esperanton en mia Diocezo; plej ofte, la esperantistaj pastroj ne engaĝiĝas en la oficiala Esperanto-movado, tamen ili uzas la lingvon por propraj celoj.

En mia laboro ĉe la Seminario en Tarnòv mi renkontas neniun malhelpon. La lingvo estas oficiale agnoskita kiel libervola lingvo; mi ankaŭ ne vidas problemojn kun lernolibroj, ĉar ankoraŭ ne mankas ĉe ni la tajpiloj. Unusola problemoj, kiun mi vidas, estas manko de instruistoj kaj prelegantoj. Ja, oni ne povas enpuŝi en la Seminariojn kun iu ajn instruisto. Sed multaj el tiuj, kiuj estas kapablaj homoj, ne havas tempon kaj emon; krome, ĉion oni devas fari je propra kosto, kaj tio certe ne allogas.

Sac. Jòzef Zielonka, Tarnòv (Pollando)

● Mi ĉiam tiel opiniis, ke unu el niaj taskoj estas « bombardi » la katolikan gazetaron per informoj pri Esperanto en ĉiu lando. Mi tradukis mallongigite la artikolon « Mortis kardinalo Wyszzyński » (EK 6/81), sub la titolo; « Eble en la sekva koncilio... » Ĝi aperis en la katolika semajna gazeto *Nova Homo* en la rubriko « *Per katolikaj okuloj* », en kiu legiĝas opinioj pri gravaj problemoj, citaĵoj.

Estas vere, ke ne ĉio aperas (ĝis nun la gazeto komunikis kvar informojn de mi), sed la ĉefredaktoro bone scias, kiaj artikoloj konvenas al la gazeto. Gravas, ke oni sendu novaĵojn, informojn pri Esperanto kaj pri la eventoj esperantaj el la katolika movado. EK tre taŭgas kiel fonto. Kiu silentas, konsentas. Do, se ni silentas, ni konsentas, ke ni ne ekzistas.

Mi dankis la ĉefredaktoron pro la aperigo de la artikoleto kaj samtempe mi informis lin, ke en EK 7-8/81 aperis la pensoj pri « Ekumenismo » aperintaj en *Nova Homo*, kaj kiujn mi tradukis en Esperanton por EK. Jen, unu el la roloj de la Internacia Lingvo!

Ho ve, kiel domaĝe, ke Espero Katolika ne estas trioble pli ampleksa kaj la ĉefredaktoro ne havas kvinoble pli da tempo por ĝi!

S. Nagy, Hungario

● Ricevinte la revuon « Espero Katolika », mi multon eksciis pri nia amatega S. Patro. Ja, mi ne povas kapti Vatikanan Radion per mia aparato, tial mi malmulton sciis kaj scias ankoraŭ nun. Dankegon al vi!

El Rumanio

● Mi esprimas mian grandan ĝojon. Hieraŭ, 7.8.81, reveninte hejmen de mia unua misia marŝado unuope, mi trovis EK 7-8/81, la unuan numeron ricevitan de mi en Madagaskaro.

Mia ĝojo pligrandiĝis, kiam mi trovis mian leteron kun la foto farita en Poznań. Estas komike, ke mi ne ricevis ĉi tiun foton, kaj mi vidis ĝin unuafoje en EK.

Relegante mian presitan leteron, mi ektimas, ke oni povas pensi, ke mi multe suferas kaj plendas. Kontraŭe, kvankam estas malfacilaj vivkondiĉoj kaj mankas multaj aĵoj, mi estas tre feliĉa, ĉiam bonhumora!

Antaŭ du semajnoj mi preparis mian unuan predikon, kiun mi legis trifoje dum mia restado kun malagasioj. Komence mi skribis ĝin pole, poste mi tradukis francen, kaj donis al itala pastro, kiu tradukis malagasen. Nun mi preparas mian duan predikon, ĉar post kvin tagoj mi pasigos kelkan tempon ĉe la kristanoj loĝantaj malproksime de la misiejo.

Baldaŭ mi ekloĝos en la misiejo Marolambo: 3.500 kvadrataj kilometroj, 59.000 loĝantoj, 6.770 katolikoj, 5.120 protestantoj. Ne eblas viziti ĉiun kristanan komunumon pli ofte ol 2-3 fojon en ĉiu jaro: dimanĉe la kristanoj kunvenas por preĝi sen pastro, kunlaboras 83 katekistoj.

La nombro de la katolikoj laŭ la oficiala statistiko superas la kvanton de la personoj vivantaj laŭ la katolikaj kutimoj. Aliflanke, mi estis en vilaĝo, kie ekzistas katolika komunumo tre vivanta kaj forta malgraŭ ke neniu estas baptita, eĉ ne la katekisto.

Mi jam alkutimiĝis vivi simple, malbezoni aĵojn, kiujn mi ne povas aĉeti. Ni ricevas multon de diversaj eŭropaj landoj; sen la bonvolo kaj helpo de niaj bonfarantoj, ni ne povus, ekzemple, projekcii religiajn filmojn, montri kaj donaci religiajn bildetojn.

Mi preĝas ofte intence de ĉiuj bonfarantoj, kaj mi konscias, ke mi neniam pagos la ŝuldon de l' dankemo, plejofte al nekonatoj, sed mi ĝoje pensas, ke la Ĉiopova Dio bonege rekompencos.

P. Johano Sadowski, Madagaskaro

● Mi plene konsentas kun la artikolo en EK 7-8/81 (p. 132), ke Esperanto estas *tre* facila lingvo, tamen ne *tro* facila. Faktoj tion pravas.

En 1939 mi partoprenis jugoslavan katolikan Esperanto-kongreseton en Ljubljana. Mi celebris la S. Meson en la preĝejo de la ursulina *monaĥinejo*; sed mi vane atendis la alvenon de alia pastro, J. P., kiu, la antaŭan tagon, parolante kun mi en franciskana *monaĥejo*, estis firme promesinta, ke li predikos en Esperanto. Okazis, ja, miskompreno de la programo, kiu, ĝuste, antaŭvidis la S. Meson en la *monaĥineja* preĝejo, dum Pastro J. P. prezentiĝis ĉe tiu *monaĥejo*!

P. Lovro Kiš, Jugoslavio

KATOLIKA HORIZONTO

● La katolika loĝantaro de Usono superis 50 milionojn. Katolikoj konsistigas nun 22,5% el la tuta usona loĝantaro.

En la 33 ĉefdiocezoj kaj en la 138 diocezoj de Usono ekzistas 360 ĉefepiskopoj kaj Episkopoj, 58.398 sacerdotoj (el kiuj 35.627 diocezaĵaj kaj 22.771 religiulaj), 122.653 monaĥinoj, 12.468 seminarianoj.

La ĉefdiocezo Ĉikago daŭre estas tiu kun plej granda katolika loĝantaro (2.380.000); sekvas Los-Anĝeleso (2.230.000) kaj Bostono (iom pli ol unu miliono).

● Plenumiĝis tri jarcentoj de unu el la plej fruaj klopodoj de evangelizado de Aŭstralio. La 15-an de julio 1681, ja, estis kreita en Romo la Apostola Prefektejo de Aŭstrala Lando, kiu ampleksis Aŭstralion, Papulandon-Novgvineon kaj Antarkton (supozatajn, tiam, kiel unu solan kontinenton). La Prefektejo estis starigita de la Kongregacio por la Disvastigo de la Kredo (*De Propaganda Fide*), laŭ propono de itala misiisto, la dominikano Vittorio Ricci, kiu estis nomata unua Prefekto.

Patro Ricci, kiu vivis en monaĥejo de Manilo (Filipinoj), faris sian proponon surbaze de informoj ricevitaĵoj de iuj nederlandaj esploristoj, kiuj revenis de vojaĝo al tiuj foraj landoj. La religiulo skribis al Romo en 1676, dirante, ke li estas preta vojaĝi al la « Aŭstrala Lando »; sed la letero bezonis 5 jarojn por atingi la roman Kongregacion, tra Pacifikiko, Meksikiko kaj Hispanio. En la letero, pastro Ricci emfazis, ke Aŭstralio estas tiel granda, ke « oni povas ĝin trairi dum du jaroj neniam vidante la maron ». La Kongregacio tuj akceptis la proponon, sed la koncerna letero same bezonis 5 jarojn por atingi Manilon: tiam, pastro Ricci estis mortinta jam de unu jaro.

● Papo Johano Paŭlo dua kortuŝite brakumis, la 29-an de aŭgusto, la reĝisoron Krzysztof Zanussi, italdevenan polon. Tio okazis ĉe la fino de la projekciado de la filmo « *El lando malproksima* », en la somera papa restadejo de Castel Gandolfo apud Romo.

La filmo alfrontas la homan kaj religian travivaĵon de Karol Wojtyła, en la kadro de la historio de la katolika Pollando: ĝi ampleksas la lastajn kvindek jarojn, kaj tuŝas ĉiujn pli dramajn kaj signifoplenajn eventojn, la eksplodon de la dua mondmilito, la insurekcion de Varsovio, la ribelon de Hungario, la pli ĵusajn agitiĝojn kaj laboristajn protestojn. Karol Wojtyła neniam aperas kiel protagonisto, sed li agas paralele kun la pola historio.

La Papo sekvis la projekciadon kun profunda atento, precipe en la momentoj, en kiuj la filmo estas « *dura, senkompata, sed kortuŝa* »; li taksis perfekta la rekonstruon de la medio, bonega la interpretadon de Cezary Morawski, la aktoro, kiu nekredeble similas al la Papo; preciza kaj historie ĝusta la realigon: « *Nenio estas forĵetenda* — diris la Papo al la reĝisoro — *Dio kompensu vin pro mia Pollando* ».

(Teksto de Carandina, trad. de A.D.S., laŭ Radio Roma-Esperanto)

● Latin-Ameriko (kiu ne identiĝas kun Suda Ameriko, kvankam tiu estas ĝia ĉefa parto) etendiĝas, de nordo ĝis sudo, 10.000 kilometrojn. Sur giganta areo de 21 milionoj da kvadrataj kilometroj, vivas preskaŭ 325 milionoj da homoj, el kiuj 40% havas malpli ol 15 jarojn. La loĝantaro kreskas tre rapide: en 1900, Latin-Ameriko havis 63 milionojn da loĝantoj; 163 milionojn en 1950; laŭ la prognozoj, 690 milionojn en la jaro 2000.

Problemoj, tie, estas multaj: nekredbla malriĉeco, preskaŭ kompleta neebleco partopreni la socian kaj civilan vivon, altega infan-mortemo, manko de loĝejoj, malsanoj, senlaboreco, etnaj kontrastoj.

La Eklezio, en Latin-Ameriko, decide renoviĝis post la Dua Vatikana Koncilio. Tie, kiam oni parolas pri evangelizado, pli ol simplan anoncadon de la Evangelio oni celas ĝian *aplikon* al la realoj de la kontinento. Tio, kompreneble, havas delikatajn aspektojn, ĉar ekzistas ja la risko, ke la « interna revolucio », kiu transformas la homon per la forto de la aplikata Evangelio, estu interpretata kiel bezono de efektiva revolucio, per sloganoj kaj barikadoj.

Serioza problemoj, kiun la Eklezio alfrontas en Latin-Ameriko, estas la manko de sacerdotoj. Meznombro, latinamerika pastro devas zorgi pri 6.000 fideluloj (por komparo: en Belgio, 700; en Italio, 1.055), sed eĉ pri 250.000 en kelkaj brazilaj zonoj. Por ke ĉiu latinamerika pastro povu zorgi pri 3.000 fideluloj, oni bezonus tuj preskaŭ 50.000 novajn sacerdotojn!

IKEK: INFANA KATOLIKA ESPERANTO-KLUBO

Ni ĵus travivis bonegan kaj esperoplenan Ekumenan Kongreson en Dalfsen (Nederlando). Kiel vi ĉiuj scias, Ekumeno estas strebo por reunuigi ĉiujn kristanojn en unu solan Eklezion laŭ la preĝo de Jesuo.

La kongreso estis tre fratema, amikema. La etoso estis vere agrabla kaj familieca. Ni eĉ ĝojis, ĉar ni renkontis plurajn geknabojn el diversaj landoj. Vidante ilin mi imagis al mi, ke baldaŭ ni kapablos organizi kongreson por geknaboj. Ĉu mia revo realiĝos? Kion vi opinias pri tio?

*”Vojo, vero, vivo estas
ja Mi: ĉu kun Mi vi restas?”*

Tiun vorton de Jesuo
ni aŭskultu tre atente
kaj agadu diligente
en amstrebo sen malfruo.

Se ni celas ekumenon,
koran pacon kaj serenon,
ni traserĉu en Biblio
Lian volon, Lian gracon
kaj ni festu la donacon
pian en Eŭkaristio.



Pluraj gejunuloj partoprenis la Ekumanan Kongreson en Nederlando (foto Kondor)

Jesuo-flanke

« Mi preĝas por tiuj, kiuj kredos al mi, por ke ili ĉiuj estu unu; kiel Vi, Patro, estas en mi, kaj mi en vi, tiel ili ankaŭ estu en ni; por ke la mondo kedu, ke vi min sendis ».

Kiel bela kaj profunda estas tiu lasta preĝo de Jesuo al Sia Patro. Jesuo venis surteren, por ke ĉiu sciu, ke li havas Patron en la ĉielo; Patron, kiu volas la unuecon de ĉiuj siaj filoj.

Kion ni faras age kaj preĝe, por ke ĉiuj kredantoj je Dio estu nur unu granda familio?

IKEK-flanke

Olivero, Ĝilo, Fabrico, Nikolao, Mikaelo kaj Romualdo el Sens (Francio) skribas:

« Ni volas klarigi por vi nian esperantan agadon malgraŭ la ferioj, kiuj ĝenas iomete nin. Ĉiusabate, je la dektria kaj duono, ni venas en nian preĝejon. Tie ni trovas nian pastron kaj kun li ni purigas la benkojn. Poste venas parokaninoj por ekzercado de la kantoj por la venonta dimanĉo. Kompreneble ni partoprenas tion. Nur poste ni povas eliri por kunveni ĉe la katekisma ĉambro por nia tre rapida lernado. Nia pastro donas al ni novaĵon pri niaj amikoj el Germanio aŭ legas al ni leterojn ricevitajn de siaj kore-

spondantoj precipe italaj aŭ brazilaj. Poste ni lernas en la ekzercaro de Zamenhof aŭ ni tradukas laŭvice la artikolojn de Espero Katolika. Ofte ni serĉas en la vortaro la sencon de iu vorto nekonata de ni. Ni ĝojas, ĉar nia pastro anoncis al mi la viziton de pastro Eichkorn, kiu, reveninte el la kongreso en De Bron, trapasos ĉe ni por ripozi. Ni estas tre ĝojaj pri tio, ĉar lastan jaron ni kune pilgrimis al Lurdo kaj ni bone konas pastron Eichkorn. Ni esperas, ke vi bone fartas, kaj ni sendas al vi, kaj pere de vi al ĉiuj IKEK-anoj, niajn tutkorajn salutojn ».

Dankon, koran dankon al la mesoservantoj de Sankta Klemento apud Sens. Vi estas tre laboremaj kaj akurataj. Gratulon.

Daŭre atendas viajn leterojn kaj proponojn

P. Roger Degrelle, B.P. 23, F-54510 Tomblaine (Francio)

ASOCIAJ NOTOJ

● La membroj de IKUE, kiuj deziras esti kandidatoj por la venontjaraj balotoj, bonvolu skribi tion al la Centra Oficejo en Roma, **limdate de 31.12.81**, aldonante kelkajn notojn pri sia vivo kaj Esperanto-agado.

● **La baza kotizo por 1982 restos 22 svisaj frankoj**, kvankam multaj kostoj terure kreskis (ekzemple, la afranko de la revuo, kiu kostis 25 lirojn en januaro 1978, kostas nun 100 lirojn: kresko 300% en malpli ol 4 jaroj).

Tamen, pro la perdo de valoro de kelkaj valutoj, **kreskos la egalvaloro de la 22 svisaj frankoj por kelkaj landoj**: Francio 60 fr. fr., Hispanio 1.000 pes., Italio 12.000 liroj. Aliflanke, pro la fortega kresko de la valoro de usona dolaro, **la kotizo por Usono malkreskos** al 11 dolaroj.

Oni bonvolu pagi frue la kotizon por 1982, prefere per la Landaj Re prezentantoj; kaj **oni ne forgesu averti pri la farita pago la Centran Oficejon**, por ke ne okazu interrompo en la sendado de la revuo.

Se oni pagas per banko, **oni eksplicite indiku la nomon de la persono, kiu rajtas enkasigi** (ekz. Antonio De Salvo); fakte, per la simpla indiko « IKUE » estas tre malfacile ricevi monon de banko (ja, konforme al la itala jursistemo, IKUE ne havas propran juran personecon).

Ni danke akceptas pagojn per bankbiletoj, en kiu ajn valuto.

● Kiu perdis, en la Kongresejo en Dalfsen, flavgrizan zonon de (pluv)mantelo, bv turniĝi al s-ino Li de Jong-Roobeek, Poelruit 13, NL-2771 RC Boskoop, Nederlando.

● Francisko Walas, Mazańcowska 42, PL-43.346 Bielsko-Biała, Pollando, serĉas bildetojn pri la hispana « *Cristo de Limpas* ». Rekompenco laŭdezira.

● Irena Missiuro, skr. poczt. 3, PL-10.001 Olsztyn (Pollando), delegitino de UEA, tradukistino, serĉas seriozajn gekorespondantojn el la tuta mondo, precipe malsanulojn kaj invalidojn.

FONDUSO « PENTEKOSTO »

Komence de la kuranta jaro la subskribinto havis la ŝancon ricevi, flanke de iu familio, kiu deziras resti nekonata, la grandan sumon de 10.000.000 da italaj liroj. La deziro de la monoferintoj estas nur la Dia Mizerikordo.

Tiu-ĉi bonfaro estis la konkludo de pluraj kontaktoj kun la heredontoj, kiuj disdividis la sufiĉe grandan kapitalon de la ankoraŭ vivantaj gepatroj. Ili donacis sen difinita celo, kaj ili akceptis mian proponon starigi komencan kapitalon por fonduso, kies estonta rentumo sufiĉos por seminariano el evolulandoj ĉe romaj katolikaj universitatoj aŭ pormisiaj Institutoj, kun la sindevigo esperantistiĝi kaj helpi ĉe la IKUE-centra Oficejo.

Oni enlistigis kelkajn kondiĉojn por ilin submeti al la rajtigo de la IKUE-estraro. Se, pro iu ajn kaŭzo, ĝi ne akceptos, la monoferintoj konfidos ĉion al la itala sekcio de IKUE (UECI); efektive, tiu malavara familio konfidis al mi ĉiujn eblajn decidojn pri tiu kapitalo, nune kaj estonte.

Sed mi jam transdonis la tutan kapitalon al D-ro De Salvo, bona kaj fidinda mastrumanto kaj fakulo pri ŝtata administracio, do des pli pri IKUE-financo. Li apartigis ĝin, kaj, je la fino de la jaro, sufiĉe alta rentumo aldoniĝos al la kapitalo mem aŭ ĝi estos preta por la studento.

Komence oni donis al la fonduso la nomon de iu mortinta familiano de la donacintoj; poste oni preferis « *ESPERO* », sed... la nunaj eventoj kaj iniciatoj sugestis alian titolon.

Honore al la Sankta Spirito, la « Aŭtoro » de la unua mirakla lingva interkompreniĝo (Agoj, 2), kiu indikis al la unua Eklezio la forigon kaj la venkon de la babela subpremanta lingva sinteno; je memoro de la 1.600-a jarreveno de la Koncilio de Konstantinopolo (381), kiu temis pri la doktrino de la Sankta Spirito « Sinjoro kaj Viviganto, kiu kun la Patro kaj la Filo estas kunĝlorata kaj parolis per la profetoj », kaj la 1550-a jarreveno de la Koncilio de Efezo (431), kiu dogme proklamis la Virgulinon Marian « Dipatrina »; omaĝe al la invito de la Sankta Patro Papo Johano Paŭlo dua, kiu instigis la tutan Eklezion, per letero adresita al la Episkoparo la 25-an de pasinta marto, celebri tiujn datrevenojn per specialaj iniciatoj; do, interkonsente kun tiu malavara familio, oni decidis fine elekti la nomon de la fonduso je « *PENTEKOSTO* ». Des pli, ke oni proponis festi la Pentekoston kiel « *NIA FESTO* » (v. EK 6/81).

Nia Protektantino de la Espero, la Senmakula, tre intime rilatanta kun la Sankta Spirito, kiu estigis Sin « Dipatrina », tre ĝojos pro tia bonfaro je signo de la Pentekosto, en kies centro Si estis.

Restis nur, pligrandigi la fonduson. Kiamaniere oni aldonis al la bazaj 10 milionoj alian milionon? Jen!

Mi adresiĝas per ĉi-vortoj kompreneble al ĉiuj, sed precipe al miaj kunfratoj, des pli al la paroĥestroj. Tial permesu al mi miajn spertojn tiurilate.

Ĉiujare en mia paroĥejo oni monkolektas plurfoje por la malriĉaj Landoj, por la Misiistoj ktp. Kutime en ĉiuj paroĥpreĝejoj oni tion faras. Mi

anoncis al la fidelularo mian intencon disdoni parton al la fonduso favore al malriĉa evolulanda studento en Romo. Tial mi havigis al D-ro De Salvo aliajn 417.000 itallirojn el paroĥaj monkollektoj kaj 300.000 oferitajn de unuopaj paroĥanoj tiucele. Ĉu vi deziras koni ankaŭ la lastan kazon? Jen: S-ro X suferis aŭtomobilan akcidenton sen iu ajn konsekvenco. « *Se mi ricevos iom da mono fare de la respondeculo, mi donos ĝin je bonfaro* » - diris al si mem s-ro X. Tial, post la ricevo de 300.000 italliroj, la bonŝansa paroĥano sin turnis al mi kaj donacis la sumon por bonfaro. Mi klarigis al li mian intencon, kaj li tute konsentis. Tiel oni aldonis al la 10.000.000 alian milionon kaj 17.000 lirojn.

Mi scias, ke ne tiel ofte okazas tiaj aferoj. Tamen, ili okazis, kaj mi ilin interpretis kiel signon de la Dia Providenco.

Karaj kunfratoj, kial ne ankaŭ vi?... La fonduso « PENTEKOSTO » atendas viajn konkretajn reagojn samkiel fare de la samkredanoj esperantistoj. Guton post guto ni konstruos firman kaj daŭran bonfaradon, tre allogan por la porpastraj studentoj kaj por la misiistaj Institutoj.

Intertempe, kion ni faras? La usona teologia studento en Romo Kevin Laughery serĉos la adresojn de ĉiuj misiaj revuoj kaj bultenoj. Al ili ni, kiel eble plej baldaŭ, adresos artikolanoncon pri tiu fonduso, pri Esperanto, pri IKUE ktp. kaj atendos la reagojn. Tiucela komisiono poste elektos la plej taŭgan studenton je nia celo. Samtempe, ni informos ankaŭ la IKUE-Landajn Reprezentantojn de la evolulandoj, por ke ili kontribuu al la propono de studento kaj al lia elekto. Tiamaniere, ni klopodos atingi samtempe plurajn celojn: la karitaton laŭ la ordono de Kristo, la helpon al misia studento, la diskonigan informon ĉe misiaj instancoj pri esperanta katolika movado, la akiron de estonta pastro al esperanta movado, kaj... eble estontan altrangulon de nia Eklezio!

Ni preĝu la Sanktan Spiriton por nia movado, ĉar ĝiaj venkoj estos nur laŭ la Dia Volo. La Senmakula peradu niajn klopodojn pro niaj preĝpetoj.

Sac. Duilio Magnani, Italio

LINGVAJ PROBLEMOJ EN LA EKLEZIO

● Aperis moderna traduko de la Biblio en lingvon *gjujerati*, parolatan de ĉirkaŭ 40 milionoj da homoj en nord-okcidenta Hindio. La traduko estis farita, dum 17-jara laboro, de la hispana jezuito Jesùs Cueli kaj de nekristanaj indiĝenoj. Por ke la teksto estu viva kaj aktuala, la tradukistoj estis elektitaj (laŭ la literatura ĝenro de la originalo) inter poetoj, rakontistoj, ktp. La rezulto estis, ke la tradukaĵo estas tiel unuaranga el literatura vidpunkto, ke ĝi povos allogi ankaŭ nekristanojn. La libro ampleksas 1.600 paĝojn. La kostoj estis pagitaj de la Pontifikaj Misiistaj Agadoj, de la germana instanco « *Missio* » kaj de hispanaj samnacionoj de Patro Cueli.

● La lingvoj de la indiĝenoj estas ĉiam pli vaste uzataj en la katolika liturgio en Aŭstralio. Tion deklaris la Episkopo de Darwin, Mons. John O'Loughlin, kiu estas prezidanto de la episkopara komitato por la indiĝenoj. Li indikis

kiel ekzemplon la misian stacion *Port Keats*, en la diocezo Darwin, kie oni jam tradukis en la lokan lingvon la jaran ciklon de la Mesleĝaĵoj kaj la preĝojn de la fideluloj. Multaj himnoj kaj kantoj, krome, estas en la loka lingvo kaj kun tradicia muziko. Io simila okazas ankaŭ en *Bathurst Island*, alia misia stacio en la diocezo Darwin.

LA EVANGELIO AL LA AFRIKANOJ

Teksto de Bianchi, traduko de De Salvo — laŭ Radio Roma/Esperanto

« *La unua amo de mia junaĝo estis por la kompatinda Negrujo, kaj, antaŭ 17 jaroj, lasinte ĉion, kion mi plej multe amis, mi venis en ĉi tiujn regionojn por labori kun la celo mildigi ĝiajn jarcentajn malfeliĉojn* ». Tion oni legas en unu el la sennombraj leteroj, kiujn la granda misiisto Daniele Comboni skribis, de la afrika kontinento, al geparencoj kaj geamikoj. « *Negrujo* » estis la nomo, kiun mezepokaj geografoj donis al tiu senfina afrika regiono, kiu etendiĝas de la dezerto de Saharo ĝis la Grandaj Lagoj, de la Ruĝa Maro ĝis la Gvineo Golfo. « *Negrujo* » estas la traduko, farita de tiuj geografoj, de la araba termino « *Bilad-es-Sudan* », kiu signifas, ĝuste, « *Lando de negroj* ». En ĉi tiu mondo, izolita de la resto de la Tero, turmentata de malsato kaj de soifo, suferanta pro inundoj kaj malsanoj, sed precipe pro la vendado de sklavoj, disvolviĝis, en la dua parto de pasinta jarcento, la agado de Daniele Comboni, kiu mortis en Kartumo (Sudano), apenaŭ 50-jara, ĝuste antaŭ unu jarcento.

Neniu misiisto estas fremda, en kiu ajn mondoparto: lia agado disvolviĝas laŭ valoroj, kiuj estas ĉiamaj kaj universalaj. Mond-civitano, sendita de la Eklezio en la nomo de Kristo — kiu ordonis: « *Iru ĝis la limoj de la Tero!* » — la misiisto estas altvalora peranto inter la unuopaj Eklezioj, kaj li efike kunlaboras en la kreado de universala Eklezio. Jen kial la kombonianoj sentas la devon transdoni la apartan mesaĝon de Comboni, kiu estis vere revolucia, se oni konsideras ĝian tempon, kaj pro tio estas eksterordinare aktuala.

La intuicio de Comboni efektiviĝis en la kadro de la misiista revekiĝo de la Eklezio en la 19-a jarcento, kiam la eŭropaj landoj celis la konkeron de Afriko. Bedaŭrinde, ne ĉiam estas eble distingi la misian fenomenon de pasinta jarcento disde la tiama koloniisma modo, trempita de la ideologio de « *Eŭropo centro de l' mondo* ». La konkerintoj, kiuj tro memfide opiniis, ke ili havas la monopolon de la civilizo, laŭfakte forgesis la historian pasintcon, ofte glorplenon, de la afrikaj socioj. Ĉi tiu estis la miskompreno de la eŭropa koloniismo, kiu klopodis transformi Afrikon en alian Eŭropon.

Daniele Comboni havis la kuraĝon agi nekomformisme, lokante la afrikan homon en la ĉeflokon, en sia animzorga agado. Afrikanoj, laŭ Comboni, ne nur kapablas ricevi instruon, sed ili ankaŭ kapablas decidi pri sia estonteco kaj pri tiu de la resto de l' mondo. Evangelizado, do, kiel anonco, sed ankaŭ kiel remalkovro, laŭ mirinda plano, kiu celis la saviĝon de la afrikanoj pere de la afrikanoj mem.

Landaj reprezentantoj de IKUE

Oni pagu la abonkoton al la landaj reprezentantoj, samtempe avertante pri tio la Centran Oficejon (por ke tiuj estu en ordo la ekspedo de la revuo). La jara kotizo de membro-abonanto estas 22 svisaj frankoj aŭ egalvaloro. Pro la daŭra ŝanĝiĝo de la kurzoj de valutoj, precipe de svisa franko, la sube indikitaj egalvaloroj havas nur informan celon.

Argentino

P. Bruno Ostropolski
Av. Libertad, 75
RA - 3360 Obera, Misiones

Aŭstralio

C.A. Sullivan
56 Royal Terrace
Hamilton
Queensland 4007

Aŭstrio

W. Mudrak
Beatrixgasse, 19/9
A - 1030 Wien III - p.k. 105.713
ŝil. 170

Belgio

M. Audenaert
Beekstraat, 6
B-9100 Lokeren
p.k. 000-0522242-91; b. fr. 400

Brazilo

P. Petro Urbaitis
caixa postal 4421
BR - 01000 S. Paulo, S. P.
cruz. 500 - aerp. 700

Britio

J. Harris
26, Dare Road
Birmingham B23 6PD
br. p. 6

Ĉeĥoslovakio

Aleš Berka
Na Vyhlídec 1002, p.s. 28
CS - 755.01 Vsetín

Francio

P. R. Degrelle
B.P. 23
F-54510 Tomblaine
p.k. 2555 38 L, Nancy
fr. fr. 60

F. R. Germanio

J. Kondor
Alte Schloss-Str. 25
D- 545 Neuwied 21 - Engers
p.k. 113726-673, Ludwigshafen
Rhein; gm 25

Hindio

P. O. M. Lucas, ofm Cap.
Shanti Ashram, Gandhipuram
Coimbatore 641012

Hispanio

Miguel Martínez
Av. da San José 105, pral 3a
Zaragoza - pes. 1.000

Hungario

P. Lajos Köbor
Fö u. 58
H-9365 Dénesfa

Irlando

P. J. O'Reilly
« Monksilver », Howth Summit
Co. Dublin

Islando

Torfi Ólafsson
Melhaga, 4 - 121 Reykjavík

Italio

P. Duilio Magnani
Viale C. Zavagli, 73
I - 47037 Rimini (Forlì)
p.k. 18590364 (UECI) -
lir. 12.000

Japanio

Hatirō Matubara
Namimatu-tyō 4/5
596 Kisiwada-si, Oosaka-hu

Jugoslavio

P. Prof. Franjo Gruić
Strossmayerov trg, 5
YU-54400 Djakovo
din. 300

Kanado

Sino P. Proulx
790, 80^{ème} rue Est
Charlesbourg 7 Québec
G1H 1A9

Kolombio

Jorge Velásquez G.
Apartado aéreo 51740
Medellín

Suda Koreo

P. Kiseng Kim
I.P.O. Box 2752 - Seoul

Madagaskaro

Roger Randrianekena
BP 14
Ambatondrazaka

Meksikio

P. J. M. Claramunt
Apartado postal 318
Oaxaca, Oax

Nederlando

S. P. Smits
Dunantstraat, 164
NL 2713 VC Zoetermeer
p.k. 685124 - gld 27

Norvegio

S. Murak
Semsvn 166, N - 1370 Asker

Nov-Zelando

G.D. Raynor
49 Sunny Grove
Wainuiomata, Wgtn

Pollando

P. J. Gotter
Trzebnice 113
PL - 59312 Chocianowice
zl. 300

Portugalia

Port. Esp. Asocio
Rua Dr J. Couto 6 r/c A
P-1500 Lisboa 4
600 esk.

Svislando

P. Francisko Bommer
Collège S. Marie
CH - 1920 Martigny
sv. fr. 22

Tajlando

P. M. Perray
GPO Box 1846 - Bangkok

Tajvano/Formozo (Ĉinio)

P. Marko Ŭang Bu-jung
Catholic Church
T'ei-ping Road
Tainan Taiwan R.O.C.

Urugvajo

R. Zeballos Morales
Av. Centenario 3099, C., Ap. 805
Montevideo

Usono

Mark B. Weddell
P.O.B. 1042
Indian Rocks Beach
Florida 33535
us. dol. 11 - aerpoŝte 15